

Hermann Claudius,

## Ŝanĝiĝas daŭre ĉio

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ŝanĝiĝas daŭre ĉio  
En tiu mondo ĉi.  
Sed sama restas Dio,  
la mondon tenas Li.

Kaj kio ajn alvenos,  
nur estas Lia ag',  
la mondon Li plutenos  
ĝis la plej lasta tag'.

La homoj elektitaj  
por la anar' de Di'  
ja estas nek perditaj  
nek sen la grac' de Li.

*Traduko de la Germana poemo "Es wandeln sich die Reiche" de HERMANN CLAUDIUS (Hermano Klaŭdio, \*1878-10-19 – †1980-09-08) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1984.*

*MR-099-1 / Arg-342-686 (2007-04-24 11:38:10)*